I. F. E. A.
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N°5 kaj 6 - Februaro kaj marto 1955

## 7a I.F.E.F. - KONGRESO EN ZÜRICH

8 - 13 Majo 1955

E' con soddisfazione che constatiamo come già siano arrivate le prima adesioni al Congresso di Zurigo e come il L.K.K. sia venuto nella determinazione di togliere il sovraprezzo di F.Sv. 3 per le adesioni pervenute dopo il 31 Gennaio u.s. restandò di conseguenza la quota di adesione pari a F.Sv.15.

In più, con lettera in data 7 febbraio corr. lo stesso L.K.K., riferendosi a quanto richiesto per un pensionato, che ha già dato la sua adesione al Congresso, rispondeva che lo stesso pagherà "nur la duonan kongreskotizon" oltre godere degli altri benefici quì in calce riportati, dopo averli stralciati dalla Circolare N°3 del L.K.K.

Da quanto sopra scritto e sottosegnato, risulta che i nostri pensionati potranno godere del beneficio della riduzione del 50 % sulla quota di adesione al Congresso, che aggiunta alla riduzione del 50 % sulla spesa di viaggio dal confine a Zurigo e ritorno, più la possibilità di alloggio con poca spesa, se non gratuito,è chiaro invito ai nostri Soci pensionati a partecipare al 7° Congressò Internazionale dei ferrovieri di Zurigo.

Gratuito sarà pure il viaggio per la escursione - post-Kongreso- da Zurigo a Vevey, ferma restando la quota di F.Sv.5 per spese di viaggio sulle ferrovie private alpine.

Queste notizie confermano quanto il L.K.K. Svizzero va dimostrando e cioè che la vita in Svizzera non è poi così costosa come generalmente si crede; rinnoviamo quindi un caldo invito ad essere presenti in Zurigo al 7° Congresso, contemporaneamente invitando ad affrettarsi ad inviare l'adesione al nostro "Peranto" samideano Cesare CERONI BASSANI Via S.Leonardo 14 Verona.

Si avverte che le adesioni che arriveranno dopo il 5 Aprile p.v. non potranno essere accettate in quanto il L.K.K. non accetterà adesioni pervenute dopo il 15 Aprile p.v. e ciò sia per ragioni organizzative, sia per la buona riuscita del Congresso, che auguriamo di essere il migliore dei precedenti.

Dalla Circolare N°2 del L.K.K. stralciamo il punto 3, che dice;

DELEGACIO DE UNIFORMITAJ KOLEGOJ = Laù propono de kolego De Bruyne,ni antaùvidas aranĝon kun kolegoj en uniformo. Necesas esplori la eblecon, ĉar temas pri nova aranĝo kaj ni petas vian firman respondon, ĉu du aù tri kolgoj el via lando konsentos kunporti sian uniformon kaj ĉu ili rajtas je tio. Ni povas aranĝi tiun aferon nur, se el minimume 8 landoj du aù tri kolegoj skribe konsentas veni en sia uniformo aù

kumporti ĝin kaj ni ne povas kontentiĝi nur kun dek respondo, ne uti_las al ni, se vi skribos, ke tio ordiĝos antaŭ fervojaĝo. Se ĝis 28a de Februaro el 8 landoj ni havos firman promeson ni zorgas pri la aranĝo, alikaze per informilo ni informos vin pri rezigno.

Dalla Circolare N°3 del L.K.K. stralciamo:

L.K.K. havas grandan plezuron komuniki al vi ke la Svisaj Federaciaj Fervojoj konsentos grandan transportfavoron al la partoprenantaj de la 7a Internacia Fervojista Kongreso.

a) Vojaĝo Landlinc - Zürich kaj returne

1) Aktivaj fervojistoj - senpage veturo laŭ internacia konvencio. (mendu la bileton pere de via propra fervoja direkcio)

2) Familianoj de aktivaj fervojistoj, pensiuloj kaj iliaj familianoj, aktivaj fervojistoj de privataj fervojkompanioj (kiu normale ne ĝuas transportfavorojn en Svislando) inkluzive la kolegoj en Sarlando - duonan prezon por la irvojo kaj reveturo. (familianoj de aktivaj fervojistoj en Anglujo, Austrujo, Benelukso, Germanujo kaj Italujo mendu la bilet-legitimilon samtempe kun la aktiva fervojisto, laŭ la konvencia deĵora vojo) La ceteraj mendu la bilet-legitimilon rekte ĉe L.K.K. ĝis la 31a de marto 1955.

b) Postkongresa ekskurso de Zürich al Vevey (Les Plèiades)

Libera vojaĝo por ĉiuj partoprenantoj !

Mendo de bileto por la postkongresa vojaĝo ne estas necesa.
La postulita sumo de F.Sv.5 entenas la veturprezon sur la montofervoj. Kongresanoj ne mencitaj sub a) 1) kaj a) 2) devas aĉeti normalajn biletojn.

Nia programo: La laboroj de L.K.K. jam tiom progresis, ke eblas mencii kelkajn detalojn, instigajn al partoprenado. Ĉiuj aranĝoj de la kongreso okazos en la sama konstruaĵo: LIMMATHAUS. L.K.K. ne timas la kostojn por kontrakte certigi al si tiun praktikan restoracio/hotelon.

La Kongresa Malfermo estu pli solena, oficialuloj, gastoj kaj landaj reprezentantoj lokiĝos sur la scenejo. Plej fama oratoro promesis al ni la festan paroladon. S.B.B. por la unua fojo promesis oficialan reprezentanton al la kongreso. La filmvespero ebligos vojaĝon tra ĉiuj turisme interesaj regionoj de nia lando. Unika fariĝos la Folklora Vespero kun jodlistoj, kostumoj, standardjetanto, alpkornblovanto, gimnastikado kaj kantado en la kavar naciaj lingvoj.

Hotelprezoj: Por eviti miskomprenon, ni sciigas ke la hotelprezoj menciitaj en "informilo n°1" validas por unulitaj ĉambroj. Por dulitaj (dupersonaj) ĉambroj oni kalkulu maksimume la duoblan prezon.
En la prezoj la matenmanĝo, servmono, imposto kaj kosto por perado de trafikoficejo estas enkalkulitaj. Tio aliloke ne estas kutimo, sed havas grandajn avantaĝojn. Kutime aldoniĝas al la publikigitaj prezoj amaso da kromspezoj, ofte ĝis triono de la ĉambrokosto.
En Zurich nepre ne plu aldoniĝos iu ajn kroma elspezo al la indikitaj prezoj. Konsiderante tiun fakton vi konsentos kun ni, ke Svislando estas nemultekosta lando.
Krome, ni povis jam certigi al ni po 200 litoj en la du plejmalaltaj hotel-kategorioj. Por la kongresanoj do estas plej bone antaŭzorgita.

KOMUNIKOJ PRI LA POSTKONGRESA KONFERENCO EN SAARLANDO

La intereso en administracia kaj sindikataj rondoj estas granda. Helpu ankaŭ vi ke ni bone sukcesu. Necese estos ankaŭ, ke el ĉiuj landaj karavanoj de la ĉefkongreso en Zürich partoprenu minimume unu parolonto.

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

J U B I L E A   K O N G R E S O

31 Julio - 6 Aŭgusto 1955, BOLOGNA -

N-ro 4 kaj 5   O F I C I A L A   K O M U N I K O   Februaro-Marto

Honora Protektanto: La L.K.K. havas la honoron anonci, ke akceptis esti Honora Protektanto de la Jubilea Kongreso S-ro D-ro Luigi EINAUDI Prezidanto de Italujo.

Peto al Pioniroj: La L.K.K. deziras havi la nomojn kaj koncernajn detalojn de kongresanoj de la Jubilea Kongreso, Kiuj ĉeestis ankaŭ la Unuan Kongreson en Boulogne sur Mer, Francujo.

Adreso de la Kongreso: Poŝtaĵoj por la kongreso nepre portu la nomon de la kongreso. Alvenas leteroj adresitaj nur al "C.I.T." kaj tiu instanco malfermas ilin. La kongresa oficejo estas en la sidejo de CIT.

Kongresejo: La ĉefe kongresa ejo de la Jubilea Kongreso estos la Universitato de Bologna.

Kotizoj: Post 31 marto la kotizoj plialtiĝas. Bonvolu konsulti la tarifon. Aliĝiloj haveblaj ĉe Landaj Asocioj de U.E.A. kaj la Kongresa Oficejo. En la adreso nepre citu la nomon "40-a Universala Kongreso de Esperanto".

Limdato: Kiel kutime, la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio. Aliĝiloj devas esti ĉe la L.K.K. aŭ ĉe la Perantoj je tiu dato. En julio la administrantoj FERMAS LA KONTOJN por ordigi la kalkulojn necesajn je kontrolo kiam alvenas la kongresanoj. Pagojn kiuj venas post 30 junio, ni skribas en "ŝvebantan" konton kaj redonas al la koncernaj personoj je alveno. Sendante monon zorgu do ke ĝi atingos la L.K.K. antaŭ la fino de junio. L.K. ne povas fari esceptojn de tiu praktiko.

Gazetara Servo: Oficialaj instancoj, kiuj deziros ricevi dum la kongreso la bultenojn de la Gazetara Servo, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al la L.K.K. por ke ĝi faru la necesajn antaŭzorgojn. Skribu adreson klare kaj indiku, ĉu oni deziras ilin a) ĉiutage, b) post la kongreso aŭ c) ĉu iu persono (nomu lin) mem prenos ilin en la Gazetara Servo.

Infana Programo: Al ĉiu kongresano ĝis la aĝo de 15 jaroj la L.K.K. sendis specialan cirkuleron koncerne apartan aranĝon. Laŭ la respondoj la L.K.K. agos.

Junulara Programo: La L.K.K. projektas specialajn programojn en la vesperoj de dimanĉo, merkredo kaj ĵaŭdo de la kongresa semajno speciale por la junularo en la aĝgrupo 16-20 jaroj (aŭ iom pli). Dancado kaj distraĵoj. Skribu al L.K.K. ĉu vi havas intereson por tio.

Statistiko (ĝis 28 februaro): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 18, Belgujo 12, Brazilo 3, Britujo 75, Danujo 24, Finnujo 27, Francujo 170, Germanujo 83, Hispanujo 5, Italujo 208, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 41, Kubo 1, Maroko 18, Nederlando 113, Norvegujo 17, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 73, Svislando 24, Usono 10. Sume el 27 landoj 937. Interesaj ciferoj: Nemembroj de U.E.A. 21,9 %; Instruistoj 18 %; Personoj sub 21 jaroj 7 %.

Nome de la L.K.K. Mason Stuttard, Konstanta Kongresa Sekretario

AVVISO IMPORTANTISSIMO - IV° NOTA DEL CASSIERE - Ripetiamo gentilmente ma caldamente l'appello del Cassiere che invita i Soci a provvedere urgentemente al versamento delle quote per l'anno 1954-55.

Sostenete la nostra Associazione! Versate immediatamente le quote sociali! L'Associazione attende il Vs/ contributo per vivere!

INVITO DEGLI AMICI AUSTRIACI - Dalla "Aùstria Fervojista Esperanta Fakrupo el LINZ-DANUBIO" riceviamo il seguente cortese invito:

Tre estimataj Kamaradoj.

La Fakrupo Fervojista de Aùstrio okazigos la 2-an kaj 3-an de Aprilo 1955 sian Jarkunvenon en Linz-Aùstrio.

Al tiu ĉi kunveno ni invitas unu delegiton kaj aliajn gekamaradojn veni al Linz por ĉeesti kelkajn horojn en nia urbo.

La delegito ĝuos senpagan loĝadon de 2/3 aprilo kaj tagmanĝon la 3-an de aprilo.

La provizora programo: Sabate la 2-an de aprilo vespere akcepto de alvenontoj, amika vespero en nia Esperanta-klubejo apud la ĉefstacidomo. Dimanĉe, la 3-an de aprilo 8,30 - 12 h. okazos la jarkunveno, 12 h. komuna tagmanĝo en gastejo al "Lokomotivo" kai posttagmeze ekskurso en la proksimeco de Linz.

Kore salutas vin la estraro

Ni dankas al la Aùstriaj amikoj ankaù je la nomo de la estraro de nia Itala Fervojista Esperanto - Asocio.

DISSENDOJ EN ESPERANTO - RADIO ROMA

Marto 1955 - a

491 merkredon la 2.an - Mondo esperantista
492 vendredon la 4.an - Leterkesto kaj bibliografio
493 merkredon la 9.an - Informoj el Italujo
494 vendredon la 11.an - Datreveno de la naskiĝo de T. Tasso
495 merkredon la 16.an - Festivalo de la itala kanzono
496 vendredon la 18.an - Revenis printempo
497 merkredon la 23.an - Florenco, urbo de artistoj kaj poetoj
498 vendredon la 25.an - La "Anunciacio"
499 merkredon la 30.an - Gastronomia Bolonjo

Aprilo 1955 - a

500 vendredon la 1.an - Nia kvincenta jubilea dissendo
501 merkredon la 6.an - Mondo esperantista
502 vendredon la 8.an - La sep paroloj de Jesuo dum la agonio
503 merkredon la 13.an - Informoj el Italujo
504 vendredon la 15.an - La lingvo Esperanto 38 jarojn post la morto de ĝia elpensinto
505 merkredon la 20.an - Opero "Vilaĝana Kavalireco" de P.Mascagni
506 vendredon la 22.an - Italaj belartaj urboj: ROMO
507 merkredon la 27.an - Projekto de nova kalendaro laù teksto de A. Ribot
508 vendredon la 29.an - Leterkesto kaj bibliografio

Prelegas: merkrede - S-ro Luigi Minnaja
vendrede - Prof.D-ro Vincenzo Musella

La dissendoj okazas de h. 18,50 ĝis h. 19,10 (M.E.T.)
Stacioj: m.31,33 = Mc/s. 9,57 Kaj m. 49,92 = Mc/s. 6,01

La Fakestro: BLASIMME

ATTIVITA' DEI GRUPPI - VERONA - Il Gruppo Ferroviario Esperantista di Verona ha aumentato le sue file in conseguenza dell'ultimo corso istituito frà i Ferrovieri, e tenutosi presso la sede del Dopolavoro Ferroviario, sotto l'insegnamento del collega Gino CORSO.In più in questi ultimi giorni ha pubblicato un bollettino, al quale auguriamo buona fortuna, che promette di uscire mensilmente. Fra i suoi scopi ha quello di tentare di diffondere nella forma più semplice le nozioni grammaticali dell'Esperanto e un modesto vocabolario Italiano-Esperanto.